

# informilo por interlingvistoj

## ipi

27-a jaro (tria serio) | n-ro 103 (1/2018) | ISSN 1385-2191

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)  
kaj Esperantic Studies Foundation

### Enhavo

1. Antaŭparolo .....	2
2. Lastatempaj publikigaĵoj .....	2
Libroj .....	2
Artikoloj.....	2
3. Multlingvismo en Internaciaj Organizaĵoj kaj en Internacia Kunlaborado.....	3
4. Ipi kaj Ifi haveblas per la Biblioteko Juan Régulo Pérez .....	4
5. Studraportaj kunsidoj dum Japana Esperanto-Kongreso .....	4
6. Okazis ĉiujara konferenco de Gesellschaft für Interlinguistik e.V.....	4
7. Internacia Somerlernejo – Lingvopolitiko kaj lingvoplanado: edukado, lingvoj kaj migrado .....	6
8. La nova Princeton Handbook of World Poetries (2016) inkluzivas Esperanton .....	7
9. Nova kunveno por Esperanto-aranĝoj en Jagelona Universitato .....	7
10. Universitata agado en Irano.....	8
11. Universitato de Sevilo: novaj kursoj.....	8
12. Noto el Bulgario .....	8
13. Italio: Esperanto kiel studfako en konferenco pri politika scienco .....	8
14. Eldonejo Iltis fermiĝas.....	8
15. Language Problems and Language Planning 41:2, 41:3 : Table of Contents .....	9
41:2 .....	9
Articles .....	9
Reviews / Criticas / Rezensionen / Recenzoj .....	9
41:3 .....	10
Articles .....	10
Reviews .....	10
16. Asembleo de la Asocio Amikoj de CDELI, kun prelego de d-ro Sébastien Moret: “Kial venkis Esperanto?” .....	10
17. Parizo: Konferenco Tutmondiĝo, Interreto kaj Unesko-Kuriero .....	11
18. Romo: Ekspozicio kaj kolokvo honore al Zamenhof .....	11
19. Lingvoj kaj la Unua Mondmilito .....	12
20. La plej gravaj interlingvistikaj kaj esperantologiaj verkoj de Aleksandro S. Melnikov .....	13

## 1. Antaŭparolo

Same kiel la antaŭaj numeroj, *Informilo por Interlingvistoj* kovras grandan diversecon de novaj eldonaĵoj, estontaj aranĝoj, raportoj pri lastatempaj konferencoj, kaj aliaj informoj. Plejparte, ĝia enhavo similas al la enhavo de ĝia anglalingva eldono, *Information for Interlinguists*. Se vi ŝatus regule ricevi unu aŭ ambaŭ el tiuj ĉi eldonaĵoj kaj ne jam troviĝas en nia dissendolisto, sciigu nin. Kiam aperos nova numero, ni informos vin pri tio, sendante al vi ligilon al la koncerna paĝo en la retejo de ESF (esperantic.org).

Nepre sendu al ni viajn novaĵojn (pri lastatempaj publikigaĵoj, konferencoj, estonta aranĝoj ktp.)!

Humphrey Tonkin

Yevgeniya (Ĵenja) Amis

## 2. Lastatempaj publikigaĵoj

### Libroj

- **Sortoj frakasitaj, Mikaelo Bronŝtejn, Eseoj**, Impeto, 2017. Bone dokumentita eseo pri ses esperantistoj-verkistoj, kiuj pereis dum la granda purigado aranĝita de Stalin. Prezo: 6.90 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo: <http://katalogo.uea.org?inf=2588>*
- **Kosmo kaj ni, La**, Galaksioj, steloj, planedoj kaj vivo en la universo. **David Galadí-Enríquez, Amri Wandel**, *Scienco kaj tekniko*, FEL, 2017 (3a eld). Unuafoje en Esperanto, kompleta manlibro pri teoria kaj praktika astronomio. Prezo: 18.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo: <http://katalogo.uea.org?inf=6428>*
- **Belarta rikolto 2017**, Premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio. **Div, Miksita literaturo**, Mondial, 2017. Poezio, prozo, eseoj, teatro. Prezo: 9.90 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo: <http://katalogo.uea.org?inf=9575>*
- **Symposium on Language, the Sustainable Development Goals, and Vulnerable Populations, New York, 11-12 May 2017**, Final Report. Study Group on Language and the United Nations, 2017. Prezo: 7.50 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo: <http://katalogo.uea.org?inf=9579>*
- **Indekso de "Informilo por Interlingvistoj" n-roj 1-99**. *Bibliografioj*, Mondial, 2017. Speciala jubilea numero (100) de faka bulteno eldonata de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Prezo: 18.00 EUR. *Pliaj informoj, reta mendilo: <http://katalogo.uea.org?inf=9578>*

### Artikoloj

- Anna-Maria Meyer. 2016. Slavic constructed languages in the internet age. *Language Problems & Language Planning* 40/3: 287-315.
- Fernando de Diego. 2017. Ĉu distre interesa? *Beletra Almanako* 29: 126-137
- Miguel Fernandez. 2017. Hispanaj nuntempaj soci-kritikaj poetoj. *Beletra Almanako* 29: 138-148
- Jorge Camacho. 2017. Recenzo de Victor Sadler, *Perversaj rilatoj* (2015). *Beletra Almanako* 29: 158-159
- Javier Alcalde. 2017. *Eduardo Vivancos: Esperanta legendo*. Intervjuo. *Esperanto* 110/11: 220-222
- Sven Ziegler. 2017. Recenzo de Ivo Lapenna, *Elektitaj tekstoj pri internacia juro*. (2017). *Esperanto* 110/11: 231-233

- Javier Alcalde. 2017. Recenzo de Sue Wright, *Language Policy and Language Planning: From Nationalism to Globalisation*, 2<sup>nd</sup> edition. *Nations and Nationalism* 23/4: 1001-1003
- Javier Alcalde. 2017 Recenzo de Esther Schor, *Bridge of Words: Esperanto and the Dream of a Universal Language*. *European Journal of Jewish Studies* 11/2.
- Javier Alcalde. 2017. Recenzo de Roberto Garvía, *Esperanto and Its Rivals. Social Movement Studies*. 16/3: 380–381.
- Javier Alcalde kaj Brigid O’Keeffe. 2018. Esperanto and the First World War. *Languages and the First World War* (blog).  
<https://languagesandthefirstworldwar.wordpress.com/2018/01/01/esperanto-and-the-first-world-war/>

### 3. Multlingvismo en Internaciaj Organizaĵoj kaj en Internacia Kunlaborado

La Studgrupo pri Lingvo kaj Unuiĝintaj Nacioj invitas vin kontribui al Simpozio pri “Multlingvismo en Internaciaj Organizaĵoj kaj en Internacia Kunlaborado” ĵaŭdon kaj vendredon, 10-11 majo 2018, ĉe Church Center, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017 (Unua Avenuo kaj 44a Strato).

Multlingvismo en internacia kunlaborado produktas kaj kostojn kaj avantaĝojn: *kostojn* ĉar ĝi postulas mekanismojn kiel ekzemple selekton de multlingva oficistaro kaj intervenon de lingvoprofesiuloj; *avantaĝojn* ĉar, se bone mastrumata, ĝi inkluzivas ĉiujn partiojn en la kolektivan decidadon, antaŭenigas interkonsenton, subtenas la liveron de programoj, kaj faciligas disvastigon de rezultoj. Sekve, ĝi favoras socian justecon kaj inkluzivon. Ĉiam pli kaj pli, oni konsideras ĝin pozitiva forto, kvankam ne ĉiuj rolantoj tiel opinias. Ene de Unuiĝintaj Nacioj, ekzemple, kaj precipe pro la manko de disponeblaj datenaĵoj, subtenantoj de multlingvaj lingvopolitikoj ofte frontas ideologian, financan kaj administran reziston, malgraŭ la kreskanta agnosko ke multlingvismo, kiel kerna valoro de UN, estas potenciala fonto de forteco.

La simpozio celas fokusiĝi je tiuj demandoj, kaj generi interesiĝon pri tiu ĉi problemaro. Ni invitas kontribuaĵojn kiuj esploras la defiojn de subtenado de multlingvismo en organizaĵoj aŭ situoj de internacia kunlaborado trans malsamaj sektoroj (ekz-e komerco, diplomatio, ekonomio) aŭ komunumoj. Ni bonvenigas teoriajn kaj metodikajn studojn, kaj ankaŭ studojn kiuj aliras specifajn praktikajn defiojn – precipe referaĵojn kies rekta fokuso estas la laboro de la UN-sistemo aŭ aliaj internaciaj entoj, aŭ esplorado kun evidentaj implico por ilia laboro.

Sugestoj pri temoj:

- evoluantaj perceptoj de multlingvismo en internaciaj situoj
- lingva inkluzivo en multlingvaj situoj
- interpretado kaj tradukado en internaciaj organizaĵoj
- rapideco de decidado kontraŭ perdo de informoj en unulingvaj kunteksto
- lingvo en internacia packonservado
- lingvo kaj homaj aŭ minoritataj rajtoj
- la ekonomiko de lingvaj reĝimoj
- lingva egaleco en organizaĵoj
- inkluziva komunikado en loka kaj internacia evoluigo
- lingvopolitiko en internaciaj organizaĵoj
- lingvo kaj daŭripovo

- multlingvismo kaj neregistaraj organizaĵoj

La organizantoj bonvenigas proponojn (prefere en la angla lingvo) de mallongaj 20-minutaj referaĵoj pri temoj ligitaj al la simpozia temaro.

Bonvolu sendi proponojn (200-vortajn aŭ malpli, kune kun proks. 50-vorta biografio) al d-ro Lisa McEntee-Atalianis (l.atalianis@bbk.ac.uk), antaŭ **16 februaro 2018**. La komitato celos fari finajn decidojn pri la programo ĝis 5 marto 2018.

#### 4. Ipl kaj Ifl haveblas per la Biblioteko Juan Régulo Pérez

Ipl kaj Ifl estas haveblaj rete per la reta Biblioteko ("Bitoteko") Juan Régulo Pérez de Hispana Esperanto-Federacio ([www.esperanto.es/bitoteko](http://www.esperanto.es/bitoteko); [biblioteko@esperanto.es](mailto:biblioteko@esperanto.es)):

<http://www.esperanto.es:8080/jspui/handle/11013/5281> (Ifl) kaj

<http://www.esperanto.es:8080/jspui/handle/11013/5281> (Ipl).

La Bitoteko enhavas ĉ. 5 mil titolojn: ĉ. 3000 el la periodo de 2000 ĝis nun kaj pli ol 2000 titolojn de 1900 ĝis 1999, kaj ĝi proponas tre riĉan kolekton de Esperanto-gazetoj, inkluzive de tiuj, kiuj ne plu estas eldonataj. En la Bitoteko oni povas serĉi per la vortoj, kiujn enhavas la tekstoj de la dokumentoj mem (ĝenerala serĉo), per la eldondato, titolo, aŭtoro kaj temo (rapida serĉo), kaj ankaŭ per pli rafinita serĉo - kombino de diversaj filtriloj. Estas ankaŭ la ebleco "Malkovri" la kolekton laŭ dokument-kvanto, kiu korespondas al malsamaj tempoperiodoj, temoj, aŭtoroj, ktp.

#### 5. Studraportaj kunsidoj dum Japana Esperanto-Kongreso

Kiel programero de la ĉiujara Japana Esperanto-Kongreso kutime okazas tiel nomataj "studraportaj kunsidoj", organizitaj de de Japana Esperanto-Instituto. Kadre la 104a kongreso en Jokohomo, la 4an de novembro 2017, ree okazis la kunsido. Ĉeestis 41 personoj. Prezidis HIROTAKA Masaaki. Post enkonduka saluto de KIMURA Goro Christoph okazis kvar raportoj. SANO Hiroshi raportis en la japana kun la titolo "Subteni multi-lingvo-lernadon helpe de Zamenhofa tabelo kiel pivot-lingvo". Li prezentis dudimensian tabelon el naŭ ki-vortoj kaj respondajn tabelojn en aliaj lingvoj por lernantoj. WATANABE Tuyosi raportis en la japana kun la titolo "Kuroita Kacumi kaj Esperanto". Li montris, kiel evoluis la ideoj de Kuroita rilate al lia naciismo kaj Esperanto. YAMASITA Toshihiro raportis en Esperanto pri "malfacilaj problemoj eltraduki 'Rakontaron Genĝi'". Li montris kelkaj ekzemplojn de pluraj tradukintoj. KAWARA Hiro raportis en Esperanto pri "Kosmopolita aktivado kaj la avantaĝo de Esperanto". Li prezentis sian sociteorian analizon pri Esperanto kaj tutmondiĝo. Eldoniĝis broŝureto kun resumoj de la kvar raportoj. La ĉi-jara kunsido estis bone balancita laŭ temoj, lingvouzo kaj laŭ konsisto de la raportantoj: prelegoj pri lingvoinstruado, traduko, historio kaj sociologio en po du en la japana kaj en Esperanto, fare de du veteranoj kaj du junuloj. (HIROTAKA Masaaki/KIMURA Goro Christoph)

#### 6. Okazis ĉiujara konferenco de Gesellschaft für Interlinguistik e.V.

De la 10a ĝis 12a de novembro 2017 en Berlino okazis la 27a ĉiujara konferenco de Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL, 'Societo pri Interlingvistiko'). Partoprenis pli ol 40 personoj, pliparte membroj de

GIL. Por la unua fojo la konferenco okazis ne en la periferio, sed en la centro de la germana ĉefurbo, kio eble klarigas la sufiĉe grandan nombron de partoprenantoj.

La ĉefa temo estis "Plurlingveco en Eŭropo" (tradukita el la germana laborlingvo, same ĉiuj titoloj sube). Kiel kutime prezentiĝis ankaŭ aliaj prelegoj el la vasta kampo de interlingvistiko laŭ la kompreno de GIL. En 2017 oni sukcesis varbi prelegantojn kaj partoprenantojn de ekster la rondoj de GIL, eble ankaŭ pro la temo ne limigita al planlingvoj. La jenaj prelegoj estis prezentitaj:

- D-ro Cyril Brosch (Lepsiko): *Pri la stato de plurlingveco en la universitata Erasmus+-programo* – pri la kontraŭdiro inter la oficiala samrangeo de la eŭropaj lingvoj kaj la praktiko fakte ofte anglalingva inter interŝanĝaj studentoj.
- Prof. D-ro Liliana Ruth Feierstein (Berlino): *Esperanto: Lingvo kaj utopio* – pri la loko de Esperantismo resp. la ideologio(j) de Zamenhof en la kadro de la juda diskurso pri la estonteco de la eŭropaj judoj en la 19a jarcento.
- Prof. D-ro Sabine Fiedler (Lepsiko): *Esperanto kaj plurlingveco* – pri la ŝanĝiĝanta sinteno de la Esperanto-movado rilate plurlingvecon kaj pri la multlingvaj praktikoj en la hodiaŭ Esperanto-parolantaro.
- D-ro Michele Gazzola (Berlino): *Lingvoj kaj labormerkato* – pri aktualaj studoj pri la rilato inter plurlingveco kaj pli bonaj ŝancoj en la labormerkato (rilate dungigo kaj salajron) kaj pri ties metodologiaj problemoj.
- D-ro Bernd Krause (Forchheim): *La lokoj de koloroj kaj la formigo de kolorovortoj en elektitaj planlingvo-projektoj aprioraj* – pri interligo inter la formado de leksikeroj en tiu kampo kaj la primonda scio havebla en la respektivaj tempoj (kolorteorioj).
- Krunoslav Puškar (Križevice, Kroatujo): *Kalkeoj en Esperanto* – pri morfemkombinaĵoj (precipe kunmetaĵoj) el la frua tempo de Esperanto, kiuj estis prunte tradukitaj precipe laŭ germanaj kaj rusaj modeloj, kaj pri ties posta evoluo.
- Mira Sarikaya (Hamburgo): *Universala lingvo ĉe Leibniz kaj la logika konstruo de la mondo* – pri diserta projekto, en kiu ŝi volas esplori la ideon pri logika ordigo de la mondo en planlingvo skizitan de Leibniz kaj ties postan akcepton ĉe filozofoj kiel Carnap.
- D-ro Britta Schneider (Berlino): *Plurlingveco en Berlino, from above and from below'. Institucioj, diskursoj kaj desubaj movadoj* – pri la malsama trakto de plurlingveco en la publika diskurso depende de la prestiĝo de la koncerna lingvo kaj pri unu ekzemplo de sukcesa subteno de plurlingveco en Berlino.
- Mag. Bernhard Tuidler (Vieno): *Kolekto por planlingvoj kaj Esperanto-Muzeo* – unuflanke pri la historio, celoj kaj strukturo kaj aliflanke pri aktualaj evoluoj kaj projektoj de la Kolekto por planlingvoj kaj pri ties planoj por la venontaj jaroj.
- Kristin Tytgat (Antverpeno): *Plurlingveco kaj lingva konscio* – ĝenerale pri la problemoj de plurlingvaj multlingveco, precipe rilate pedagogion kaj psikolingvistikon, kun speciala atento de la spertoj kun Esperanto.
- Prof. D-ro Bengt-Arne Wickström (Budapeŝto): *Lingvoplanado surbaze de kostoj* – pri la diversaj specoj de ekonomiaj elspezoj, kiujn povas necesigi plurlingveco, kaj pri la kalkulado, en kiuj okazoj tia elspezo povas esti inda.

- Fritz Wollenberg (Berlino): *Viva Esperanto-kulturo – prezentata de la nova jubilea libro de EABB "Esperanto – lingvo kaj kulturo en Berlino kaj Brandenburgio – 111 jaroj"* – pri ampleksa artikolaro aperinta antaŭ nelonge, kiu enhavas ankaŭ kontribuojn interlingvistike interesajn.
- Louis von Wunsch-Rolshoven (Berlino): *La imago pri Esperanto en la sciencoj* – pri negativaj taksoj de Esperanto bazitaj sur ignoro aŭ miskomprenoj, kiujn oni trovas inter sciencistoj, kaj pri eblaj kaŭzoj de tiu nescienca sinteno.

Apud la scienaj kontribuoj sabate vespere okazis demonstrado de la nova saĝtelefona programeto *Amikumu*, kiu helpas trovi lingvopartnerojn (precipe ankaŭ en planlingvoj) fare de ĝia teĥnika estro Chuck Smith, al kio aldoniĝas vigla diskuto.

La skribaj versioj de la prelegoj aperos en 2018, en la nova ĵurnalo *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik* (JGI, 'Jarlibro de la Societo pri Interlingvistiko'), kies unua eldono aperis en Oktobro de 2017 kaj estis prezentita dum la konferenco.

Krome okazis la asocijare necesa jara ĉefkunveno de GIL kaj fina diskuto pri la konferenco, kie aperis unuaj proponoj por la venonta konferenco de GIL en Novembro de 2018.

(D-ro Cyril Robert Brosch)

## 7. Internacia Somerlernejo – Lingvopolitiko kaj lingvoplanado: edukado, lingvoj kaj migrado

Inter la **23a kaj la 27a de julio 2018** ĉe la Universitato por Eksterlandanoj (University for Foreigners) en Sieno, Italio, okazos Internacia Somerlernejo kun La temo "Lingvopolitiko kaj lingvoplanado: edukado, lingvoj kaj migrado". La evento celos doni teoriajn kaj praktikajn sciojn en la kampo de multilingvismo, kun socilingvistika kaj etnolingvistika aliro. Oni diskutos la sekvajn temojn:

- analizo kaj pritakso de lingvaj politikoj kaj lingvoplanado;
- edukaj politikoj pri dulingvismo kaj kultura diverseco;
- alfabetigo en kunteksto de migrado;
- superdiverseco kaj lingvistika pejzaĝo;
- lingvo kaj ekonomio.

La somerlernejo provizos ankaŭ informojn pri esplormetodologioj (kvantaj kaj kvalitaj) en la kampo de lingvistiko, socilingvistiko kaj etnografia esplorado. Laborlingvoj estos la itala kaj la angla.

Oni invitas partopreni la doktorajn kaj postdoktorajn studentojn kaj esploristojn, kiuj interesiĝas pri la temoj de la evento, instruistojn de la itala lingvo, lernejestroj kaj la reprezentantojn de la migrantaj minoritatoj en la italaj lernejoj; oni ankaŭ invitas partopreni ĉiujn personojn, engaĝitajn en la politikon de migrado. **Eblas aliĝi ĝis la 15a de aprilo, 2018** (la aliĝilo estas havebla ĉe <https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSeT2akVgEKOCYaHhJgdCpGJZNIJoJbFjXKMvreTZiavb6T7og/viewform>). La kosto estas €150 por doktoraj studentoj kaj €200 por postdoktoraj studentoj, esploristoj kaj personoj engaĝitaj en la politiko de migrado.

**El inter invititoj estas:**

- prof. Joseph Lo Bianco, University of Melbourne;

- prof. Michele Gazzola, Humboldt-Universität zu Berlin;
- prof. Massimiliano Spotti, Tilburg University;
- profesoroj de la Universitato por Eksterlandanoj en Sieno

Michele Gazzola, esperantisto, estas konata specialisto pri la lingvaj dimensioj de la Eŭropea Unio. Joseph LoBianco, fakulo pri lingvopolitiko, estas aŭtoro i.a. de bone informita artikolo pri planlingvoj.

#### Pli da informoj:

- [http://cluss.unistrasi.it/1/105/International\\_Summer\\_school.htm](http://cluss.unistrasi.it/1/105/International_Summer_school.htm)
- [languagepolicy2018@unistrasi.it](mailto:languagepolicy2018@unistrasi.it)
- +39 0577/240142-168

## 8. La nova *Princeton Handbook of World Poetries* (2016) inkluzivas Esperanton

La nova *Princeton Handbook of World Poetries* (2016) inkluzivas Esperanto-poezion inter la prezentoj de pli ol cent grandaj regionaj, naciaj kaj diasporaj literaturoj kaj lingvaj tradicioj ĉirkaŭ la mondo. Redaktite de Roland Greene kaj Stephen Cushman, la libron eldonis Princeton University Press surbaze de la pli frua *Princeton Encyclopedia of Poetry and Poetics* (kvara eldono, 2012), kie la artikolon pri Esperanto verkis Humphrey Tonkin.

## 9. Nova kunvenejo por Esperanto-aranĝoj en Jagelona Universitato

Unu leciono de la nun okazanta en la Jagelona Universitato en Krakovo Esperanto-kurso por komencantoj estis realigita en kafejo, laŭ la temo de la leciono. La relative nova kafejo Pojnarówka estas iom surpriziga loko: ĝi troviĝas en antikva forcejo (aperanta en la listo de antikvaj memoraĵoj), iama eksperimentejo de la Agrikultura Universitato de Krakovo. La forcejo situas apud la ĉefa domo de tiu universitato (Uniwersytet Rolniczy, Al. Mickiewicza 21), en la centra parto de Krakovo, sed en silenta loko. La antikva konstruaĵo havas modernaĵojn, i.a. sian, landskale unikan, preskaŭ nevideblan energiproduktan sistemon. En la kafejo funkcias galerio de pentraĵoj kaj okazas artkursoj por infanoj.

De naŭ monatoj la kafejo kunlaboras kun universitataj esperantistoj, kaj kadre de tiu kunlaboro jam okazis kelkaj Esperanto-aranĝoj por la urbanoj (i.a. je vesperaj horoj, kiam ne eblas plu organizi ilin en la universitato). En aprilo 2017 okazis tie i.a. publika leciono de Esperanto por krakovaj infanoj (varbis ankaŭ la kafejo, kaj ĝi sola okupiĝis pri la aliĝoj). Esperanto-aranĝoj kaj esperantistoj ĉiam estas tie bonvenaj.

Informoj pri la kurso: [goo.gl/x1S3AH](http://goo.gl/x1S3AH). Por aliĝoj kaj informoj, bv. skribi al: [esperanto.instruado.jag.univ.pl\(at\)gmail\(punkto com\)](mailto:esperanto.instruado.jag.univ.pl(at)gmail(punkto com)).

La kafejo: <https://pl-pl.facebook.com/pojnarowka.kawiarnia>

La secesia enirejo de la forcejo:

<https://www.facebook.com/pojnarowka.kawiarnia/photos/a.991666977547584.1073741828.991642050883410/1130574480323499/?type=3&theater>

## 10. Universitata agado en Irano

La 30-an de oktobro okazis libera seminario pri Esperanto en la Universitato “Allame Tabatabai” en Tehrano sub la gvido de s-ro/inĝeniero Ahmadreza Mamuduhi. Partopreno estis libera en la seminario, kun la celo poste starigi Esperanto-kursojn en tiu universitato. La 7an de novembro 2017 en la universitato “Pajeme Nur” sekvis la sama seminario. En ambaŭ universitatoj jam okazas baza kurso. (Simin Emrani)

## 11. Universitato de Sevil: novaj kursoj

Laŭ informo de profesoro Vicente Manzano-Arronde, en la universitato de Sevil oni aranĝas tri grupojn da komencantoj kun respektive 6, 15 kaj 8 lernantoj.

## 12. Noto el Bulgario

Eva Boyadjieva [evab.bg@gmail.com](mailto:evab.bg@gmail.com) raportas el Bulgario: “Ĉi-semestre mi ne sukcesis organizi kurson por la studentoj en la Plovdiva Medicina Universitato pro la granda okupiteco de la ĉefo de la Lingva Departamento, ĉar samtempe li gvidas kaj la Katedron pri Urologio. Mi tamen intencas provi denove en 2018. Mi esperas kalkuli je novaj junaj fortoj kaj eksterlandaj geamikoj.”

## 13. Italio: Esperanto kiel studfako en konferenco pri politika scienco

En la urbeto Urbino okazis en la pasinta septembro la jara itala kongreso pri politika scienco. Ene de la kutima sekcio pri sociaj movadoj, ĉi-foje kompleta sesio pritraktis la Esperantan movadon. Javier Alcalde, ĉeforganizinto de la sesio, prezentis la rilaton inter la Esperanta movado kaj aliaj sociaj movadoj, kiel pacismo. Nicola Ruggiero okupiĝis pri la politika rolo de planlingvoj en konata romano de George Orwell. So Gilsu havis historian aliron de la fenomeno en konkreta mondoparto, nome Azio. Kaj Guillermo Fians esploris la nunan situacion de la movado kaj komunumo, ĉefe en Francio. Temis pri la plej internacia sesio de la tuta kongreso. Kvankam originale la prelegantoj (venintaj el tri malsamaj kontinentoj) devis paroli en la angla aŭ en la itala, fine ĉiuj prelegis en Esperanto, ĉar ĝi estis la sola lingvo komprenata de ĉiuj partoprenantoj en la sesio. Interalie, en la publiko estis alia esperantisto, Michele Gazzola, kiu prelegis pri la svisa multlingvismo en alia konferenco de la kongreso. (El *Esperanto*, novembro 2017)

## 14. Eldonejo Iltis fermiĝas

Edition Iltis 1997-2017



Hodiaŭ, post iom pli ol 20 jaroj kaj 140 titoloj, oficiale finiĝas la aktiveco de la eldona kaj libro-serva entrepreno Edition Iltis. Post la forpaso de mia edzo kaj ĉef-kunlaboranto/-aŭtoro Reinhard Haupenthal (1945-2016) mi sola nek volas nek povas daŭrigi tiun ĉi laboron.

Mi dankas al ĉiuj, kiuj dum tiuj jaroj akompanis nian vojon kaj kiuj kunhelpis ebligi la realigon de pli ol 140 libroj:

- al niaj aŭtoroj kaj helpantoj por la bona kaj fruktodona kunlaboro;
- al ĉiuj libroservoj kaj revendistoj, ĉefe al la libroservo de UEA kaj naciaj libroservoj, pro la distribuo de niaj libroj;
- al la multaj unuopaj klientoj kaj abonantoj de niaj serioj;
- al la bibliotekoj kaj institucioj subtenintaj niajn serĉ-laborojn per informoj, precipe al la Kolekto de planlingvoj kaj Esperanto-muzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno, la Bavara Ŝtata Biblioteko en Munkeno, la Ŝtata Biblioteko en Berlino, la Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en La Chaux-de-Fonds, kaj multaj aliaj;
- al la presejo MG-Imprimerie en Pernes-les-Fontaines (F) sub la gvido de François Delay, kiu dum pli ol jardeko partoprenis en la realigo de ĉiu nia projekto;
- al CDELI, por la preteco transpreni la kelkajn restantajn stokojn kaj eventuale fini kaj mem eldoni komencitajn projektojn.

(Irmu Haupenthal, Eldonistino)

## 15. Language Problems and Language Planning 41:2, 41:3 : Table of Contents

41:2

Articles

Language rights in the constitutions, organic acts, and statutes of the territories of the United States and the Freely Associated States 103 - 114

*Eduardo D. Faingold*

Compulsory African language learning at a South African university: An exploration of macro- and micro dynamics 115 - 135

*Stephanie Rudwick*

Buttering their bread on both sides?: The recognition of sign languages and the aspirations of deaf communities 136 - 158

*Maartje De Meulder and Joseph J. Murray*

Linguistic capital: Language medium of instruction policy in Hong Kong 159 - 167

*Chris Harwood and Conttia Lai*

Esperanto linguistics: State of the art 168 - 191

*Asya Pereltsvaig*

Reviews / Criticas / Rezensionen / Recenzoj

Review of Delabastita, Dirk & Ton Hoenselaars, Eds. (2015) *Multilingualism in the drama of Shakespeare and his contemporaries* 192 - 195

*Reviewed by Humphrey Tonkin*

Review of Ordóñez-López, Pilar & Nuria Edo-Marzá, Eds. (2016) *Medical discourse in professional, academic and popular settings* 196 - 200

*Reviewed by Frank Nuessel*

Review of Mazak, Catherine M. & Kevin S. Carroll, Eds. (2016) *Translanguaging in higher education: Beyond monolingual ideologies* 201 - 205

Reviewed by Frank Nuessel

Review of Hultgren, Anna Kristina, Frans Gregersen & Jacob Thøgersen, Eds. (2014) *English in Nordic universities: Ideologies and practices* 206 - 209

Reviewed by Jouko Lindstedt

Rassegna di Marazzini, Claudio & Alessio Petralli (2015) *La lingua italiana e le lingue romanze di fronte agli anglicismi* 210 - 213

Recensione di Federico Gobbo

Review of Peterson, David J. (2015) *The art of language invention: From horse-lords to dark elves, the words behind the world-building*

Reviewed by Federico Gobbo

41:3

“Leave no one behind”: Linguistic and digital barriers to the dissemination and implementation of the United Nation’s Sustainable Development Goals

Lisa J. McEntee-Atalianis

Articles

El grado de pluricentrismo de la lengua española

Carla Amorós-Negre y Emilio Prieto de los Mozos

From planned language to language planning: Esperantists’ activities in China in 1911-1958

Yalan Wang and Haitao Liu

Spelling reformers and artificial language advocates: A shifting relation

Roberto Garvía

Reviews

Review of Peterson, David J. (2015) *The art of language invention: From horse-lords to dark elves, the words behind the world-building*

Reviewed by Federico Gobbo

Review of Lins, Ulrich (2016) *Dangerous language: Esperanto under Hitler and Stalin* & Lins, Ulrich (2017) *Dangerous language: Esperanto and the decline of Stalinism*

Reviewed by Ulrich Ammon

Review of Ammon, Ulrich (2015) *Die Stellung der deutschen Sprache in der Welt*

Reviewed by Hartmut Haberland

Review of Schor, Esther H. (2016) *Bridge of words: Esperanto and the dream of a universal language*

Reviewed by Federico Gobbo

## 16. Asembleo de la Asocio Amikoj de CDELI, kun prelego de d-ro Sébastien Moret: “Kial venkis Esperanto?”

La Asembleo de la Asocio Amikoj de CDELI okazos sabaton, 3-an de februaro 2018, ekde 10h30, en la salono de CDELI (Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia) en la Biblioteko de la Urbo (Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, CH-2300 La Chaux-de-Fonds). Aferkunsidon en la mateno (ekde

10h30) sekvos tagmanĝo, kaj prelego de Sebastien Moret (Slavlingva Fako, Universitato de Lausanne) kun la temo "Kial venkis Esperanto" – Esperantlingva versio de prelego jam prezentita en decembro ĉe Unesko, Parizo, en la franca lingvo. La prelego markas la 60-jariĝon de CDELI.

## 17. Parizo: Konferenco *Tutmondiĝo, Interreto kaj Unesko-Kuriero*

**Parizo, 12 decembro.** Pli ol 150 personoj direktis sin al la 'urbo de lumo' por partopreni la konferencon okazigitan kadre de Unesko en ĝia prestiĝa sidejo, por marki la finon de la Zamenhofa Jaro 2017. La fondinto de Esperanto, d-ro L.L. Zamenhof, mortis antaŭ ĝuste cent jaroj, en 1917, kaj Unesko kaptis la okazon oficiale rekoni liajn kontribuojn al tutmonda interkompreniĝo. La konferenco estis nur unu el inter pluraj aranĝoj en Parizo kaj aliloke. En Parizo ĝin antaŭis trejnseminario por eduki Esperanto-aktivulojn pri la laboro de Unesko. Tiu seminario konsistis el kvar prezentoj – pri la funkciado de Unesko, pri Esperanto kaj Unesko, pri la nemateria mondheredaĵo (kultura programo de Unesko), kaj pri *Unesko-Kuriero*. Sekvis la konferencon fruktodona kunsido kun la ĉefredaktoro de la *Unesko-Kuriero*.

Inter la partoprenantoj de la konferenco estis juna rumanino, Nicoleta Enache, kiu troviĝas meze de unujara volontulado en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Ŝi raportis jene:

"La 11-an de decembro mi havis la ŝancon partopreni la memorkonferencon por la centa datreveno de la forpaso de L.L. Zamenhof. La memorkonferenco *Tutmondiĝo, Interreto kaj Unesko-Kuriero* okazis en salono de la sidejo de Unesko kaj kunigis pli ol 100 homojn el pluraj landoj. Inter la partoprenantoj estis multaj esperantistoj, reprezentantoj de membro-ŝtatoj de Unesko kaj oficistoj de Unesko.

La konferenco estis dividita en tri partojn. La malfermo komenciĝis per alparolo de Krystyna Zurek, konstanta delegito de Pollando ĉe Unesko, kiu direktis la atenton de la partoprenantoj al la ĉefa temo de la konferenco kaj substrekis ĝian gravecon. Ni havis ankaŭ la okazon aŭskulti la vortojn de Maryse Wanda Zaleski-Zamenhof, la pranepino de L.L. Zamenhof, kaj la vidpunkton de Stefan MacGill, vic-prezidanto de UEA. Nome de Unesko parolis s-ro Frank La Rue, la Asista Direktoro de Unesko por Komunikado kaj Informado."

Sekvis serio de prezentoj pri aspektoj de la konferenca temo:

- Sébastien Moret: "Kial Esperanto venkis"
- Jean-Claude Lescure: "Esperanto fronte al tutmondiĝo"
- Guilherme Fians: "Esperanto nuntempe kaj fronte al sia estonto: komunumo kaj siaj komunikiloj"
- Chuck Smith: "La modernaj komunikiloj serve al Esperanto"
- Trezoro Huang Yinbao: "La Unesko-Kuriero en Esperanto"
- Giorgio Novello: "Ĉu nova lingvo por Unesko?"

## 18. Romo: Ekspozicio kaj kolokvo honore al Zamenhof

